Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*EKO 2015-24 sendita al Budapeŝto, la 6an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## Reprezentanto de Unesko en malfermo de AMO-seminario

La 4an de julio en Kinŝaso, la ĉefurbo de DR Kongo okazis la solena inaŭguro de la 13a AMO-seminario, en ĉeesto de Reprezentanto de la Nacia Komisiono por Unesko en DR Kongo, s-ro Yeye Lofulia (vidu la foton).




Malfermis la seminarion la prezidanto de DKEA, s-ro J. P. Lungikisa, kaj salutis s-ro Mavomo Mafuila, la sekciestro de ILEI. La inaŭguro okazis en la malferma tago, kiam ĉeestis personoj ne povontaj sekvi la tutan seminarian semajnon. Sekvos pli da fotoj kaj pliaj raportoj. La fotoplena PDF-raporto alvenis en la lastaj 30 minutoj; ni rapidas prezenti al vi ĉiuj kelkajn scenojn el la seminaria malfermo. Ni sukcesis preskaŭ dekonigi la pezon de tiu PDF, do ni kuraĝas alkroĉi ĝin. Ni varme gratulas la organizantojn de la dua AMO-seminario en Afriko, kaj deziras sukceson kaj bonajn diskutojn al la partoprenantoj.






# TAGO DE LERNADO

**En la 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

mardo, la 28-a de julio inter 09.00h kaj 15.15

**Temo: LA ARTO INSTRUI VALIDE, VALORE, ELKORE**

09.00 Malfermo: salutoj, transdono de la Premio Mauro la Torre
09.20 Jerome CARÉ, Francio: Konciza prezento de la franca eduksistemo
09.35 Renée TRIOLLE, Francio: Lingvo-instruado: ĉu malfermita pordo aŭ enkaĝigo?
09.55 Mireille GROSJEAN, Svislando: Pacedukado: paŝoj al plena konkretiĝo
Raporto pri Tria Tutmonda Kolokvo
10.30 Prof. d-ro Alan BISHOP, Aŭstralio: Valoroj en Esperantujo: ilia karaktero kaj evoluo en edukado
10.50 Prof. d-ro GONG Xiaofeng, Ĉinio: Kapabligo de transkultura komunikado kaj E-instruado
11.10 Stefan MacGILL, Hungario: AMO tra 16 monatoj – Aktivula Maturigo ĉe UEA.
11.40 D-ro Veronika POÓR, Hungario: Muzaiko: kiajn kapablojn evoluigas la aŭskultantoj kaj/aŭ kunkreantoj?
12.00 *Paŭzo*
12.20 Prof. Dennis KEEFE, Ĉinio: La filozofio de John Dewey kaj […] la enmeto de internacia kulturo en kursoj
12.40 Prof. Nina DANILJUK, Ukrainio: Interkultura edukado kaj komunikado en la universitata E-centro
13.00 Prof. d-ro Duncan CHARTERS, Usono: Kiel plej efike lerni Esperanton kaj aliajn lingvojn
13.20 Prof. d-ro Ilona KOUTNY, Pollando: Interkultura komunikado kaj esperanto en universitata programo
13.40 Prof. D-ro Mark FETTES, Kanado: Eo kadre de interkulturaj kaj tutmondecaj studoj: Usona eksperimento
14.00 D-ro Katalin KOVATS, Nederlando: Lerni Esperanton helpe de moderna teknologio
14.35 Stano MARĈEK, Slovakio: Kiel progresas "Esperanto per rekta metodo"?
14.50 – 15.15 Ĝenerala diskuto / Fermo

Gvidantinoj de la programo: Marija BELOŠEVIĆ (Kroatio) kaj Jennifer BISHOP (Aŭstralio)

Ne okazos aparta Seminario pri Kapabligo, do la programero de ILEI ludos gravan rolon en la marda tago. Ĉiu instruisto kaj alia interesato pri instruado kaj kapabligo estas bonvena en la Forumo pri Kapabligo, kiu ekos je 16.00h samtage. Ĝia celo estas pretigi rekomendojn por la Komitato de UEA; multaj komitatanoj ja ĉeestos, sed la diskutoj estos plene publikaj kaj ĉiu rajtas kontribui.

## Muzaiko – nia retradio

Se kreiĝas sonmaterialoj pri ajna evento en Esperantujo (nelaste la UK!), ili alŝuteblas al Muzaiko ĉe: http://muzaiko.info/partoprenu/al%C5%9Dutu – por ke ili tiel publikiĝu.

Por ekscii kiel aŭskulti la retradian servon, iru al la modele bona retejo: www.muzaiko.info

## Ora Ponto - lingvokursoj

Esperanto-Centro Ora Ponto okazigos paroligan Esperanto-Kurson inter la 12-a ĝis la 25-a aŭguste 2015 en Jingchuan Gansu, Ĉinio. La ĉefaj instruistoj estos S-ro Trezoro (ĉino) , s-ro Belmonto (japano), Ardo (ĉino) kaj s-ino Susi (ĉinino). Internaciaj lernantoj estas bonvenaj. La kotizo estas 150 eŭroj inkluzive la manĝadon kaj loĝadon. Loĝantoj ekster Ĉinio pagos kotizojn al uea-konto "huyi-j" sendante mesaĝon al Trezoro (agrikulturo@126.com). Lernantoj el nepagipovaj landoj povas peti subvencion mesaĝe al la direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto.

Kontakto: S-ro Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nong Lin-Lu, Pingliang GANSU CN-744300 Ĉinio,agrikulturo@126.com, poŝtelelefono: +86+18893316800

## Afiŝoj en 84 lingvoj por la Esperanto-Tago – uzu ilin!

La 26an de Julio Esperanto-parolantoj celebros la naskiĝtagon de la internacia lingvo. Sed ĉu la ekstera mondo scias pri tio? Verŝajne ne. Pro tio Esperanto-tago. Kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio, Peter Oliver, Stefano Keller kaj Renato Corsetti preparis afiŝojn en 84 lingvoj. Ni petas ke vi uzu tiujn afiŝojn - metu ekzemple en via loka universitata biblioteko, ktp. Ni petas




ke vi kontaktu vian lokan radio-stacion, kaj ke la naciaj asocioj kontaktu naciajn ĵurnalojn kaj televidon Jen kelkaj teksto-sugestoj

http://uea.org/vikio/index.php/Teksto-sugesto

Pretere informu pri nia 100a kongreso en Lille. Ni petas ke vi uzu vian imagpovon ĉi-rilate!

Jen la afiŝoj: http://linkis.com/1rqHE.

Iru suben; elektu lingvon.

Komuniko de Brian Barker

Indonezianoj jam ekagis! http://csr-indonesia.com/2015/06/tiga-wakil-indonesia-ikuti-kongres-esperanto-di-perancis/




Ni montras la afiŝojn en la bengala kaj la indonezia bahasa.

## La Komitataj dokumentoj ariĝas en la retejo de UEA

La 35-paĝa ampleksa raporto de la estraro pri la jaro 2014, kiu disiris kun EKO 23 estas nun legebla aŭ elŝutebla el la retejo de UEA, ĉe TEKO > Komitataj Dokumentoj, kiuj ja estas libere alireblaj. Preparaj dokumentoj por la komitatkunsidoj en Lillo troveblas ĉe: http://www.uea.org/teko/komitato

## Korekto por EKO 23

Ni tie indikis (aŭ sugestis) ke post UK iros busa karavano al kulturcentro Gresillon ; ja iros grupa vojaĝo, sed ĝi estas realigota per aliaj transportiloj.

## Planŝanĝoj – AMO konkeras ĉion!

Ni planis pere de EKO 24 porti al vi la komencajn rezultojn el la analizado de la enketiloj pri Landaj kaj Fakaj Ascioj, specife pri rilatoj kun Unesko. La laboro progresetas, sed tre pezas. Tio sekvos en estonta komuniko. Nia decido okazis pro la ĵusa alveno de bonaj fotoj el AMO 13, kiujn ni volis tuj dividi kun vi. AMO 12 en Usono jam venis al fino; tuj kiam venos fotoj kaj raporto, ni komunikos tiujn al vi. Ni jam anoncis al vi pri AMO 14 ĝis 16 – serioze pripensu partopreni!

Vortoj: 880

=========

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

PDF farita de Nuance Power PDF